



LA JUNA VIVO



MONATA ORGANO POR LA INFANOJ

T.J.O. CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO, ĜIRO 382363 • JARKOTIZO 1.- NED. GULD. AŬ EGALVALORO

Mia Kato.



Mia kato havas verdajn okulojn. Ĝia nazo estas ĉiam pura. Ĝi ne estas bela kun la mallonga vosto. Kiam ĝi manĝis sian supon, ĝi lekas siajn lipharojn. Ĉiun matenon ĝi sidas sur tabuleto kaj lavas sin. Kiam la tualetto estas preta, ĝi iras al la subtegmentejo. Post momento ĝi revenas kun muso en sia buŝo. Ĝi ludas per la muso dum kelkaj minutoj kaj tiam lasas ĝin. Ĝi eĉ ne manĝas ĝin!

M. Liard, Francujo.

**Varbu abonantojn por „La Juna Vivo”!
Kiu nun abonas, ricevas la junian numeron senpage!**

Li estis iom avara

Dum mi ludis kun mia frato apud la rivero, mi ekvidis bovinon. Ĝi trinkis. Mi ĝin rekonis. Ĝi apartenis al farmisto en la apuda vilaĝo.

Mia frato kaj mi ĝin persekutis. Mi sukcesis kapti ĝin ĉe la vosto. Dum momento ĝi trenis min kun si, sed fine ĝi fariĝis frankvila.

Mi kondukis ĝin al la farmisto.

„Kie ĝi estis?” li diris al mi.

„Ĝi trinkis ĉe la rivero apud la domo de mia onklino.”

„Mi gratulas kaj dankas vin, ĉar vi ĝin kondukis al mi!”

Li donis al mi etan sumon kiel rekompencan. Mi ne estis tre kontenta, ĉar mi faris por li longan marŝon. Mi diris al mia frato: „Vere, li estas iom avara!”

S. Kaczor, Francujo.

(La du supraj verkaĵoj estas verkitaĵ laŭ la Freinet-tekniko).


NIA VERKILO.

Karaj junaj geamikoj, en „La Juna Vivo” vi ĉiam trovos bildojn, ĉe kiuj vi povos skribi kelkajn frazojn. Montru ilin al viaj instruistoj aŭ instruistinoj. Kiu el vi skribis la plej longajn kaj la plej multajn? Mi volas helpi vin:



Knabino sidas sub la arbo. Ŝia nomo estas Manjo. Manjo estas dek-kvarjara. Ŝi ne lernas, sed sidas. La arbo estas pli alta ol Manjo. Sur la arbo estas multaj folioj. Sur la arbo ne estas fruktoj. Ĝi ne estas fruktarbo. Estas somero, ne vintro, ĉar en la vintro ne estas folioj sur la arboj.

Kaj nun vi skribu kelkajn frazojn!




1.



2.



3.



4.



5.



6.

(Por kurs- kaj klubgvidantoj): En ĉi tiu rubriko ni estonte donos materialon, per kiu la juna lernanto povos verki kelkajn frazojn rekte en Esperanto. La bildoj kaj eventualaj sugestoj devigu lin al ne-tradukado el la gepatra lingvo. Ĉiuj gelernantoj povos partopreni: komencantoj fabriku nur kelkajn simplajn frazetojn; jam-iom-progresintoj skribu pli ampleksan „verkaĵon”. Por ĉiuj nia rubriko estu „Verkilo”, kiu paŝon post paŝo konduku al verkado en Esperanto kaj per Esperanto. — En la du antaŭaj n-roj de LJV ni metis la unuajn provpaŝojn sur ĉi tiu vojo. Laŭ nia impresio gvidantoj kaj lernantoj ŝatas ĉi tiun manieron. Ni decidis publikigi kompletan serion en LJV. Ĝi tute adaptiĝas al la metodo „Sub la Verda Standardo” kaj la gelernantoj, kiuj tralaboris la unuan volumeton (Laborilon I), trovos taŭgan materialon por kroma ekzercado. Tamen ĝi estas same taŭga por gejunuloj, kiuj studis laŭ alia metodo. Ĝi nepre ne volas sin anonci kiel nova metodo por komencantoj. Ĝi estu kaj restu instigilo al verkado rekte en Esperanto por gejunuloj, kiuj **mem** jam povas fari kelkajn frazojn.)

P. K.

Kiel la eskimoj kuiras sian viandon.

La eskimoj ne konas kuirilojn. Por kuiri siajn mangaĵojn, oni metas ilin en malgrandan haŭtsakon plena je akvo. Post tio oni ardigas ŝtonojn sur fajro. La varmegajn ŝtonojn oni mergas en la sakon. Oni tiel longe daŭrigas tion, ĝis la akvo bolas kaj la viando estas kuirita.

Interparolo.

Valerio: Haltu momenton, Maŭrinjo, mi bezonas vian helpon.

Maŭrino: Ĉu mi povas helpi vin? Per kio? Espereble ne per mia nova pluvombrelo, ĉar ĝin mi ne pruntedonos!

V.: Ne, via helpo estos tute alispeca. Vi korektu mian verkaĵon por „La Juna Vivo”.

M.: Pri kio vi verketis? Ĉu pri la ŝajne neniam alvenonta somero?

V.: Tute ne. Mi respondis al la demando en la antaŭa numero de LJV: „Ĉu vi iam travivis tre embarasan sperton?”

M.: Kial vi faris tion? Ĉu vi pensas, ke vi estas verkistino? Per-

fektan scion pri Esperanto vi certe ne havas. Oni ridos pri via verkaĉo, en kiu la eraroj abundos sendube.

V.: Kvankam mi ne estas perfektulino, mi tamen havas vivo-spertojn kiel ĉiu. Kaj mi kuraĝas meti ilin sur paperon. Ĉu vi volas helpi ĉe la korektado?

M.: Vere, vi meritas mjan helpon pro via kuraĝa entrepreno, sed ho ve! mia kapablo ne sufiĉos. Mi petos al Georgo, li estas lertulo. Jen li alvenas. Georgo, ĉu vi hodiaŭ jam plenumis vian bonan agon? Se ne, tuj faru tion, korektante la manuskripton de Valerio.

Georgo: Ĉu Valerio verkis romanon? Kaj al neniu ŝi parolis pri ĝi!

M.: Romanon ŝi ne verkis, sed tamen ŝi kuraĝe respondis al la demando en la antaŭa numero de LJV pri la embaraso spertita. Ŝi hontetas pri eblaj eraroj kaj tamen volas sendi la verkaĵon al la redaktejo, ĉar la rakonto estas vera kaj interesa.

G.: Volonte mi tralegos vian manuskripton, Valerio, kaj notos miajn rimarkigojn. Mi tamen atentigas vin pri tio, ke vi ĉiam povas sendi viajn verkaĵojn ne-korektitaj al la redaktejo de LJV. La redaktorino forigas ĉiajn erarojn kaj ĝojas, ke la junularo mem kunlaboras por plenigi la gazeton.

V.: Tiom pli bone. Ofte mi sentis la deziron sendi respondan artikoleon al la redaktejo pro la tro kuraĝaj artikoloj de Kon Walsh ekzemple. Sed mi timis pro nesufiĉa lingva kapablo.

G.: Do, verku kaj ensendu ĉiumonate ion al LJV, tiam vi baldaŭ venkos vian timon kaj eĉ ne plu bezonos ies helpon ĉe la korektado.

M.: Nun ankaŭ mi volas sendi artikoleon al nia redaktorino. Kiam ĝi aperos tute korekta en LJV, mi ĝojos pro tio, ke mi jam povas partopreni en la diskutado en „La Juna Vivo”.

V.: Kaj eble ni gajnos belan premion!

G.: Sukceson, amikinoj. Sendu baldaŭ, ĉar mi konkurencos kun vi! Saluton, etulinoj!

M.: kaj V.: Ĝis revido, heroo!

D

D estas la interesa damludo
iam mi ludis ĝin en malgranda budo.
D ho estas la rapida damcervo,
tra kampoj ĝi kuras kun verovo.
D estas la bela peza dalio,
ĝi floregas en la somera julio.

D estas la daktiloj el norda Afrik',
aĉetu ilin en la frukta butik'.
D estas la bela blua Danubo por mi,
ĝi estas rivero, tamen ĝin dancas ni.
D estas por ĉiu la nombro dek tri:
feliĉo aŭ malfeliĉo, vi mem povas elekti.
D estas du, du, nur du, du,
duope, duope d estas du.

Rogiero.

Pri la enigmo en la antaŭa n-ro: Vidu la liniojn de kvinpinta stelo.



INTERNACIA JUNULARKUNVENO

Versailles 3-10 aŭg. '49.

Unue urĝa peto: Kiu intencas partopreni kaj ankoraŭ ne anoncis sin, bonvolu fari tion tuj! Lastmomente anoncante vin, vi multe malfaciligas la organizadon! Bonvolu klare plenigi la aliĝilon kaj nepre menciu aĝon kaj sekson. Ĉiu, kiu loĝas pli ol mil kilometroj de Versailles povas ricevi finanĉan subtenon. Turnu vin tiucele al s-ro Bizet en Wierre-au-Bois. Post 1 julio oni ne plu povas anonci sin.

Jen la programo:

Merkredon, la 3-an de aŭg.: Alveno de la partoprenantoj. — Je la 20-a h. komenciĝos interkonatiĝa vespero. Komuna kantado.

Ĵaŭdon: Matene vizito al la urbo Versailles. Posttagmeze vizito al la kastelo kaj parko de Versailles. La Trianonoj. — Je la 20-a h. oficiala malfermo. — Brita vespero.

Vendredon: Matene vizito al Parizo: oficiala akcepto en la Urbodomo tie. — Posttagmeze aŭtobusekskurso tra Parizo. — Je la 20-a h. nederlanda vespero.

Sabaton: I.I.K. — Kunsido. Liberaj promenadoj. Posttagmeze: laborkunsido de TJO. Je la 20-a h. granda publika festvespero en teatro (espereble **ĉiuj** partoprenantoj helpu en la programo, por ke la propagando estu kiom eble plej efika al la vizitantoj nesesperantistaj! Se eble kunportu naciajn vestojn.)

Dimanĉon: Matene: diservoj (en Versailles estas protestanta, katolika kaj juda preĝejoj). Posttagmeze: Akvofestoj en la Kastelparko. Vespere: Lumfestoj.

Lundon: Matene: paroladoj, diskutadoj. Posttagmeze: vizito al St. Germain en Laye, Reuil Malmaison (per aŭtobusoj). Vespere: festa kunesto.

Mardon: Matene dua vizito al Parizo. Posttagmeze vizito al la Zoologia Ĝardeno de Vincennes. Vespere: adiaŭa vespero.

Merkredon: Foriro de la partoprenintoj.

Ĉiutage: ellitiĝo je la 7-a h., matenmanĝo je la 8-a h., tagmanĝoj je la 12-a kaj 18-a h.; enlitiĝo je la 22-a h; ĉiumatene 15 minutojn da gimnastiko antaŭ la matenmanĝo. Se eble esperantistaj kursoj.

Por la komuna kantado nepre necesas, ke ĉiu partoprenanto konu la himnon „La Espero” kaj la oficialan TJO-kanton „Marŝkanto de la Junular”. Ambaŭ troviĝas en la nova eldono de la LJV-kantaro. Kiu ankoraŭ ne posedas ĝin, povas mendi ĝin ĉe la TJO-Libroservo. Prezo 0,75 guld.

(Ni ankoraŭ atentigas, ke plej ofte estas kantataj la n-roj 1, 3, 4, 8, 12, 14, 17, 19, 20, 21 kaj 30. Oni do jam povas studi la melodiojn).

Dua listo de partoprenontoj: El Anglujo: Jack Bearley; s-ino Symes; Ann Symes; Jenn. Raines; Marg. Simmonds; Ph. White; Deane Borup; Ph. Hart; G. Watkins; L. G. Watsen; f-inoj Sawyer kaj Chesterton; Betty Francis; Eni Lloyd; Gridget Dennelly; Marg. Hopper; Harris Bronwen; Joan Bate; Maureen Walters; Gw. Taylor; Dor. Kilgoun; Eil. Beens; Wildman Sheila, Marian Webb; Olive Evans; Marg. Green; Sh. Gummins; Patr. Derry; Fr. Willmet; Patr. Spencer; Joan Steventon; f-ino J. Benett kun amikino (Londono); f-ino E. Rothwell (Wansted).

El Francujo: Marg. Knittel; Fél. Banach; Jacq. Magny; Mon. Morin; Renée Sétan; Ginette Filbien; Georgette Lekieffre; Paulette Nicaise. S-ro George (Besancon); s-ro Jean (Velleclair); ges-roj Turin (Pontarlier). **El Germanujo:** M. Schmidt (Konstanz). **El Italujo** verŝajne venos grupo de 15 personoj. **El Nederlando:** Koos Jonker; Th. Knegt; Liesbeth Ligtermoet; Ko Wallenburg; Wichert Kuipers; Hans Meerman; Atie Verdoorn; Ton Driessen.

Ricevitaj donacoj: f-ino M. S. en Ilford (Brit.): 15 ŝil.; f-ino W. en Ilford (Brit.): 15 ŝil.; f-ino B. en Ilford (Brit.): 15 ŝil.; s-ro v. K. en Haarlem (Ned.): 5.— guld.; s-ro G. en Besançon (Franc.): 10.— guld.; s-ro G. T. en Brislington (Brit.): 10.— guld.; ges-roj P. en Burnley (Brit.): 3,50 guld.; s-ino H.-W. en Purmerend (Ned.): 2,50 guld.; f-ino C. F. en Hago (Ned.): 2,50 guld.

f-ino R. en Wansteadt (Brit.): 15 ŝil.; f-ino L. en ? (Franc):

300 fr.; s-ro L. en ? (Franc): 200 fr.; franca sekcio de G.E.E.: 1.000 fr.

Kiu post la TJO-kunveno deziras resti en Versailles poŝtrevene turnu sin al s-ro Omont, 66 rue Albert Joly, Versailles.

Atentu, ke Radio-Parizo (31,60 m) nun elsendas Esp.-programon de la 18-a h. kaj 15 min. ĝis la 18-a h. kaj 30 min. (mezeŭropa tempo).

T.J.O.-RUBRIKO.

(sekr. A. Schouten, n-ro 122, Oosthuizen, Ned.)



Estimataj geamikoj, kie ajn en la mondo.

Kiel provizora prezidanto de T.J.O. mi deziras atentigi vin pri nia bela Junular-Organizo.

TJO celas: konsciigi la junularon pri tutmonda interfrateco kaj akceli ĝin pere de propagando de la lingvo Esperanto inter la junularo de la tuta mondo, aranĝado de internaciaj renkontiĝoj, legado de komuna gazeto, korespondado en Esperanto

kaj ĉiuj indaj rimedoj por interfratigi homojn de diversaj nacioj, religioj, rasoj kaj politikaj konceptoj.

Kiel junulargvidanto mi scias, ke vi havas viajn malfacilaĵojn. La pasinta mondmilito detruis multajn el viaj idealoj, forprenis multajn valorajn jarojn, kiuj neniam revenos.

Sed la mondo ne haltas, ni ĉiuj devas iri antaŭen kaj, gejunuloj de hodiaŭ, ĉiuj okuloj direktas sin al vi.

Vi devas konstrui, kion viaj gepatroj detruis. Sed kiumaniere? Ne ĉiu por si mem, sed ni ĉiuj kiel mondcivitanoj.

Oni nomas la junularon de hodiaŭ indiferenta kaj tro maldiligenta por havi idealojn. Al vi, esperantistoj inter ili, la honoron pruvi, ke vi ne estas morta, ke vi volas kunlabori al la rekonstruo de nia mondo!

T.J.O. volas helpi vin. Skribu al ni pri viaj malfacilaĵoj, legu nian gazeton, disvastigu nian lingvon. Ĉiu membro de nia junularmovado gajnu novan membron por TJO.

Al ĉiuj junaj esperantistoj en la tuta mondo ni vokas: „Unuigu vin en nia bela organizo!”

Al ĉiuj aliaj esperantistoj: „Subtenu nin!”

Multaj el niaj membroj ne povas pagi sian kotizon. Pagu por ili en kiu ajn maniero.

Oni legas nian gazeton en 1500 familioj. Sed tio fariĝu almenaŭ 2000.

Junularo de la tuta mondo, ni estas pretaj bonvenigi vin!

C. Geurts, lernejestro, Edam.

Ĉeĥoslovakujo: Bonvolu atenti la novan adreson de la ĉesperanto (s-ro Fr. Masek): Domov Mladych, Tylova 427, Most (ĝiro Ĉ 2.331).

Danujo: Anstataŭ soldatiĝi la ĉesperanto dum unu kaj duona jaroj devos servi kiel civila laboristo. Kiu havas tempon kaj emon dum tiu tempo transpreni lian taskon por TJO? (Adr. Chr. Hansensvej 4, Holbaek).

Pro spacomanko ĉi tiu numero ne enhavas foton de ĉesperanto.

Korespondadresoĵ.

Ofte ni ricevas plendojn pro ne-respondado de korespondantoj. Kiam vi petis korespondantojn, vi almenaŭ unufoje respondu!

Kiam vi ne deziras daŭrigi vian korespondadon: sciigu tion, por ke viaj korespondantoj ne vane atendu leterojn de vi!

Ĝeinstruistoj kaj gvidantoj: atentigu viajn lernantojn/anojn pri tio! Per nerespondado oni detruas la emon al korespondado!!!

Aŭstrio: S-ro F. Feistl, Borich 108, Grossveitsch, Stirio, 21-j. kaj lia 12-j. frato dez. kor. kun samaĝaj gejunuloj en la tuta mondo.

Bulgarujo: S-ro Penko Iv. Dimčey, Várbovka, Pavlikensko, 20-j., dez. amikan korespondadon kun gesamideanoj en la tuta mondo. Certe respondos.

Ĉeĥoslovakujo: Ivan Joza, 20-j. studento, Postbox 101, Č. Budejovice, dez. kor. per ilustr. poŝtk. kun la tuta mondo. Respondo certa.

16-j. ĉeĥoslovaka skolto dez. kor. k. samideanoj kaj skoltoj en la tuta mondo. Frantisek Baborak, České Lipa, Pod Hurkou 1412.

Danujo: 5 danaj knabinoj, kiuj lernas Esperanton, dez. kor. per pk. (ĉiuj 10-12-j.). Skribu al s-ino Ellen Andersen, Tegelvaerksalle 11, Aalborg).

Franĉujo: S-ro Gérard Saily, 52 rue Victor Hugo, Desvres, P. d. C., dez. kor. kun gesamideanoj en ĉiuj landoj, pri diversaj temoj.

Antoine Piot, 11 rue de Metz, Saint-Quentin, Aisne, havante tendon, serĉas junulon (15-16-j.) por bicikle ekskursi en Franĉujo, en aŭgusto. Arango pri gastado.

Ges-roj Delagneau (ĝeinstruistoj), Les Fourneaux par Chailley (Yonne) deziras korespondi kun gekolegoj en ĉiuj landoj.

S-ro Ajzenlefel Jacques (21-j. fraŭlo), 43 rue de Maubeuge, Rousies (Nord), dez. kor. kun geamiko en la tuta mondo.

S-ro F. Baronnet, 11 rue Gardie Neuvy Saint, Sépulcre (Indre) serĉas korespondantinojn por siaj 13-18-j. kursaninoj.

Germanujo: Kiu eksterlandano (proks. 20-j.) vizitos min en aŭg. '49 por bicikli kun 4 junuloj tra „Eifel“? Heinz Siemens, Tönisberg b. Krefeld.

Edith Fonrobert, 20-j. f-ino, dez. kor. per p.k. kun ĉiuj partoj de la mondo. Adr.: Werstener Feld No. 245, Düsseldorf-Eller.

F-ino Hildegund Feick (19-j.) serĉas laboron en la eksterlando, prefere ĉe esperantista familio kun infanoj. Momente ŝi estas stenotipistino. Ankaŭ iom parolas france kaj angle. Adr: Heppenheim/Bergstr. (U.S. Zono).

Günther Jakob Postfach, Ansbach-Mittelfranken, dez. kor., interŝ. pk. il., poŝtm., kun ĉiuj landoj, precipe kun inoj ĉiuaĝaj.

Gejunuloj 16-21-j. dez. kor. kun samaĝaj gekorespondantoj el ĉiuj landoj. Esperanto-Junulargrupo, Wiedensbrück i West., Kirchstr. 15.

21-j. esp.isto serĉas korespondadon per let. kun gesamideanoj. Speciale pri: Aviado senmotora. Horst Pattken, (20b), Elvershausen, Kr. Northeim.

Hispanujo: K-do José Cuadras Soler, „Centro Artesano“, Prat de Llobregat (Barcelona) dez. kor. kun tuta Ameriko. Respondo certa.

Nederlando: Kiu eksterlanda f-ino dez. senpage pasigi unu semajnon en tre bona familio en Nederlando, dum la monato julio? Necesas perfekte paroli Esperanton. Skribu al C. Geurts, Lernejestro, Edam.

16-j. knabo, Herman v. d. Mark, Oudenoord 67bis, Utrecht, dez. kor. kun samaĝa knabino en Nederlando aŭ en eksterlando.